

1922-01-13-sergeant-fousek_1

Mia kara Samideano,

Ĉu fine mi povas skribi trankvile al vi? Mi esperas sed tamen mi tute ne estas certa.

Mia vivo de post du semajnoj estas tiel plenigita de movado ke mi malfacile povas skribi longe. Sed nun kiam mia filo ne plu estas hejme estos pli facile. Li, kiel ĉiu jare, forlasis nin por Lille daŭri siajn studojn, ĝis Julio.

Vi sendube ricevis mian P.K. el Parizo kie, ni tri, pasigis 5 tagojn. Ni tre forte amuziĝis & tiu ŝanĝo estas tre bona fizike & mense. Mia edzo iris por kelkaj procesoj.

Kia alloganta & belega urbo estas nia kapitalo & mi estas fiera pri ĝi. Ni iris al la Opera & vidis „Rebecca“ de Cesar Franck – „L' heure Espagnole“ de Maurice Ravel & „Dancoj grekaj(?)“ (Daphnis & Kloé) ankaŭ de M. Ravel. Tiu-ĉi estas juna franca & fama muzikverkisto franca (28jara). Ĉiu vespere ni iris al bela teatro. Tage mi estis en la grandaj magazenoj. Tio estas tre laciganta & tiel varma.

Pri magazenoj, mi ne vidis en Praha grandajn aŭ tre belajn magazenojn. Ĉu ili ekzistas? Mi legis tre belan artikolon en fama gazeto franca: „Le Mercure de France“ pri Praha & pri la Bohemanoj - tretre interesa. Preskaŭ ĉio estis laŭdanta.

Kiel mi dankas vin pri via letero de la 18 de la

1922-01-13-sergeant-fousek_2

pasinta. Ho! Ĉu estas eble ke ĝi alvenis je tiel malproksima dato? Sed ĉar mi ne respondis tuj, mi multe pli ofte pensis al vi mia kara respondanto, ĉar ĉiu tage, mi rigardis vian leteron & pripensis: „Hodiaŭ, mi provas & mi tiel deziras skribi al Li!“ Ĉiam alvenis malhelpo & ĉagrenita mi vidis ke ne estis eble. Do, vi rimarkos ke mi pli pensas al vi kiam mi ne skribas. Mi vidas vin ridentan & vi diros: „Oni vidas bone ke ŝi estas edzino de advokato.“ Ĉu ne? Jes, mi estas certa ke sur via buŝo rideto venas. Nu! Ĉu ne estas vere? Nun, vi ridetas ankoraŭ pli forte, ĉu ne? Kontenta mi estas se mi povas ridetigi vin.

Ankaŭ kontenta mi estas se mia portreto plaĉis al vi. Al mi ĝi malplaĉas. La ridetanto esprimo ne estas mia & la tutaĵo ŝajnas ne natura & ankaŭ la vizaĝo tute en ombro malplaĉas al mi. Mi pli ŝatas kiam okuloj estas lumigitaj. Sed, neniam mi povas esti sukcese fotografita. Mi, malpacience atendas la promesitan foton de vi.

Mi ankaŭ memoras bone la lecionon por elparoli Přelouč & ankaŭ kiel mi estis timema diri tion al vi. Mi memoras & memoros ĉion el la Kongreso kvazaŭ estis hieraŭ. Mi multe parolis pri la Praha balo hieraŭ, ĉar mi iris, kiel kutime, al nia baleto & dancante, rakontis al miaj kundancantoj kiel oni dancis en Praha. Oni petis de mi, ĉu oni dancis la „novaj dancoj“? Ĉe ni, estas ĉiam la „Fox-trot“ & „One-step“ (unupaŝo), la „Tango“, la „Bostono“, la „Shimmy“, k. t. p. Ili ne estas facilaj & oni devas

1922-01-13-sergeant-fousek_3

preskaŭ rekomenci lerni ĉiun fojon kun ĉiu nova dancanto. Oni estas tiel okupata pri la paŝoj ke oni ne tiel bone povas ĝui la pleuron danci sen pripensi al io ajn.

Kion mi dancis kun vi? Bostonon eble?

Hodiaŭ gravaj sciigoj en la gazetoj. Renverso de la tuta ministraro & foriro subita el Parizo de Lloyd Georges. Ni ne volas cedi niajn rajtojn al Germanujo & ni postulas ke ili pagu ĉion. Lloyd Georges & la Angloj volas ke ni forlasu multe por plibonigi & niveligi la internacian komercon & ekonomion. Ni rifuzas. Poincaré (malnova bonega prezidanto de la F. Respubliko) estas nomita Prezidanto de Ministraro. Vi sendube legos tion antaŭ ol ricevi tiun leteron. Mi opinias ke ĉie, la estonteco ne estos roza!

Vi sendube estas en via nova loĝejo & kontenta. Almenaŭ mi tion esperas. Mi tiel deziras ke vi estu ĉiam kontenta & feliĉa dum via vivo.

Mi pensis al vi la tagon de via koncerto & dankas vin pri via invito. Kiel mi ne havis flugilojn por ĉeesti rapide por aŭskulti vin? Sed, vi bone scias ke la ĉeesto estas ebla sen la materiala ĉeesto.

Do, mi tamen estis en via koncerto & trovis ĝin tre bela, precipe la kantetan parton.

Pri „bridĵo“ mi ne ludis de post longa tempo, eble 3 semajnoj. Mi multe eliris vespere & mi legis belajn leterojn ankaŭ

1922-01-13-sergeant-fousek_4

Vi diras ke vi ĉiam sopiras, vane, je idealoj. Nature, ĉar kiam oni atingas la deziratan idealon, ĝi ne plu estas idealo. Idealo, laŭ mia opinio, estas kvazaŭ konstanta deziro. Idealoj estas revoj en kiuj oni deziras neatingeblajn nehaveblajn feliĉojn. Kiam ili ekzistas, ili ne plu estas idealoj.

Kiel vi, mi estus tre malbona piaulino (religianino) ĉar kiam mi vidas aŭ kredas veron (?) ĉiam la dubo alvenas: „Ĉu tio estas vero? Kiel pruvi ĝin, k. t. p.“ mi ĉiam vidas la kontraŭan argumenton – do mi tute ne vere scias kion mi kredas. Bedaŭrinde. Eble tiu, kiu kredas, blinde, tion kion oni diris al li estas pli feliĉa. Kio estas pli bona? Blinda, kreda feliĉo aŭ dubo okuloj malfermitaj & tute ne certa feliĉo?

Vi demandos ĉu mi veturos Helsinko-n. Mi ne kredas – tro da maro (kiun mi malŝatas estante sur ĝi) – ne tre bela lando. Mi kredas ke ne iros multaj. Sendube multekosta. Eble la plej bona vojo estus (por ni Köln – Berlin – la Baltique – Svedujo – Stockholm (kien mi ŝategus iri por korespondenta amiko kiun mi ne vidis de 30 jaroj!!! Mi tute ne memoras lin, mi estis malgranda knabineto & li estis amiko de mia patrino. Mi sciigis la morton de mia patrino & nun li skribas ofte, belege. Li estas 54-jara) & Helsinko. En Varsovio, sendube 1923, mi certe iros. Sendube, vi ankaŭ. Estas iom malgaje, pripensi ke ĉiu foje kiam oni denove sin revidas la jaroj

1922-01-13-sergeant-fousek_5

pli & pli maljunigos la vizaĝojn. Ĉu vi ne opinias?

Mi tute ne pensas ke okazos Kongreso en Francujo. Oni ŝajnas forgesi Esp. de post la milito.

Esp. grupo aŭ klubo ne plu ekzistas en Boulogno & mi nur parolas & okupiĝas pri Esp. en mia koro & kun miaj karaj korespondantoj. Bedaŭrinda afero ĉu ne, en la 1a Kongresa urbo kie jam estis 2 & 3 grupoj?

Ĉu Eva eliras ĉiutage? & ĉu vi frue trovis en Praha la veturilon ŝian kiel vi deziris? Vi certe bone estas faranta vian patran edukadon.

Nun, vi devas esti tute lerta & al kutimiĝita, ĉu ne?

Estas tre agrabla edukado & samtempe la patro edukadiĝas, la infano ankaŭ & eĉ pli videble edukadiĝas. Ŝi devas esti tre beleta nun.

Baldaŭ 5 monatoj! Ĉu vi povas vidi al kiu ŝi similas? Ĉu ŝi estas blondhara? Vi ŝajnis al mi blonda, sed ĉe vi ekzistas kutimo tranĉi la harojn sur la tuta kapo, kiel vi. Germanoj ankaŭ faras tion. Ĉe ni & en Anglujo, neniam.

Rakontante tion al korespondanto en Moravio, li tuj sendis belegan portreton de Esp. amiko kiu deziras korespondadi. & longaj haroj, eĉ iom tro. Li ŝajnas artisto, muzikisto k. t. p. Li diris ke ne estas nur en niaj landoj ke oni portas